Hermann Claudius,

Dumnokte

tradukita de Manfredo Ratislavo

Dumnokte falis prujno
kaj faris ĝi
preĝantoj arbustojn kaj arbojn,
jen ĉiujn ĉi.

En blankaj plumovestoj
preĝante sen
moviĝo kvazaŭ staras
nun ili jen.

Ne scias la arbaro[2]
pri tio ĉi,
ĝi tiel ja beliĝis,
ĉu per magi'?

Ravite mi rigardas
Nun tion ĉi,
impresas, kvazaŭ estas
ĉiela ĝi.

Trankvile ĉe la vojo
mi haltas sen
moviĝo, revas kiel
la arboj jen.

Traduko de la Germana poemo "Über Nacht" de Hermann Claudius *(Hermano Klaŭdio, ∗1878-10-19 – †1980-09-08) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2006-03 .*

MR-250-1 / Arg-407-804 (2007-04-24 11:38:37)

[2] aŭ: Ne scias la naturo